

# STARTO

**N-ro 1/2019 (270)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



Esperantistoj en Nacia Teatro en Prago la 14-an de decembro 2018  
post la opero *Sternenhoch* de Ivan Acher enkadre de Zamenhof-tago  
**La 17-an de marto 2019 la muziko por *Sternenhoch* akiris  
Premion de la teatra kritiko**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

### **Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:**

Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

### **BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010

**Fio banka Svitavy**

## **Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gyidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidanto:** Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumado, kontado)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo) **v rezignaci**

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado) **v rezignaci**

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admiŝtras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz  
www.muzeum.esperanto.cz

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický, P. Dvořáková

## NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

### La bezono senti nin kune

Unu el miaj antaŭuloj kiel Prezidanto de UEA kutimis priskribi sin kiel “la prezidanto de ĉiuj esperantistoj.” La vortoj ŝajnas unuavide pretendemaj. Eĉ se oni enkalkulas ĉiujn aligitajn membrojn de UEA (la membrojn de la aliĝintaj landaj asocioj), sendube ili konsistigas nur iun onon de la monda esperantistaro: duonon, kvaronon, okonon, kiu scias? Preter difinaj defioj, pro la disvastiĝo de interreto la lingvo estas pli kaj pli facile lernebla kaj uzebla ekster ajna organiza kadro. Se multiĝas komencantoj kaj progresantoj, kiuj apenaŭ scias, kio estas UEA – en kiu senco mi estas ilia prezidanto?

Kaj tamen, tamen... mi komprenas mian antaŭulon.

En la regulaj retkunsidoj de la Estraro, ĉiun duan semajnon, ni traktas amason da temoj kiuj tuŝas la vivon de Esperantujo, ne nur en la riĉaj landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko, sed krome kaj eĉ precipe en la “plimulta mondo” – la landoj, kie loĝas la plej granda parto de la homaro. En tiuj kunsidoj, oni ekhavas pli ĝustan komprenon de la vasteco kaj diverseco de nia tutmonda komunumo. Kaj temas ne nur pri la nunaj esperantistoj. Nia Estraro devas krome pensi pri la potencialaj esperantistoj – pri tiuj milionoj da homoj, kiuj ankore estas niaj samideanoj, eĉ se ili ankoraŭ ne trovis sian vojon al la lingvo. Ili ekzistas ĉie, en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de la mondo, kaj ne nur en tiuj lokoj, kiujn ni mem persone konas aŭ konsideras gravaj.

Tiu malfermiteco, tiu zorgo pri ĉiuj homoj, kies korojn tuŝis aŭ povus tuŝi la

revo kaj realo de Esperanto – tio estas kerna vivneceso por asocio, kiu aŭdacas nomi sin universala. Mi estas fiera, ke UEA ekde sia fondo ludas tiun vojmontran rolon. Tiuj samaj valoroj respeguliĝas ekzemple en niaj fondaĵoj, nemalhavebla rimedo por konkrete esprimi solidarecon inter homoj pagipovaj kaj nepagipovaj, inter Nordo kaj Sudo, inter Oriento kaj Okcidento. Miloj kaj miloj da tiaj agoj de reciproka, transkultura aprezado kaj subteno fluas tra niaj kontoj ĉiujare.

Ankaŭ la nova membrosistemo de UEA enkorpiĝas tiujn valorojn. Ĉiu membriĝo de homo el riĉa lando subvencias la malpli kostan aliĝon de homo el malpli riĉa lando. Ĉiu membriĝo estas, do, solidara ago. Kiel ajn evoluos la organizaj kaj kulturaj formoj de la Esperantomovado, mi estas certa, ke restos bezono de tia komuna universala asocio, en kiu ni povas senti nin kune – asocio kiu ebligas al ĉiuj homoj, per la simpla pago de kotizo, esprimi sian kredon je la nuno kaj estonteco de Esperanto.

Tial, sojle de nova jaro, mi invitas ĉiujn legantojn de ĉi tiu mesaĝo aliĝi al UEA, montrante tiel fidon al nia komuna forto. Kaj samtempe mi sendas bondezirojn ne nur al niaj aktualaj membroj, sed al ĉiuj homoj, kies vivon lumigas la lingvo de Zamenhof. Viaj zorgoj estas niaj zorgoj; viaj aspiroj estas niaj aspiroj. Kiel via Prezidanto, mi laboras kun niaj estraranoj kaj komitatanoj, niaj ĉefdelegitoj kaj komisiitoj, niaj mecenatoj kaj honoraj membroj, por kunkonstrui tian mondan asocion, kiun ni ĉiuj meritas kaj bezonas.

**Mark Fettes**

# 50 jaroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

En 1901 estiĝis en Brno la unua oficiala esperantista societo en la tiama Aŭstrio, kies ambicio fariĝi tutaŭstria asocio ne plenumiĝis kaj restis nur la klubo, kiu eĉ dividiĝis je parto ĉeĥa kaj germana. Tamen sekvis aliaj kluboj, kiuj formis Boheman Union Esperantistan (BUE, 1907) kaj samtempe formiĝis Bohema Asocio Esperantista (BAE, 1907), kiu organizis individuojn.

Post la unua mondmilito ili kunfandiĝis kiel Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (ĈAE, 1920), ĝian agadon rompis la dua mondmilito kaj post ĝi aperis Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko (EAĈSR, 1945). Aperadis gazeto *Esperantista*, Radio Praha daŭrigis elsendojn de *Verda Stacio* (ĉar studio en Brno estis bombardita kaj grave damaĝita), en 1948 estis lanĉita gazeto *Esperanto-Servo* propagandanta komunismon.

Sed en 1951 venis fino, verŝajne sub premo de Moskvo. Oni ĉesigis ambaŭ gazetojn (oficiale pro manko de papero), mutigis *Verdan Stacion* kaj la 7-an de septembro 1952 komunistoj persvadis sepdekon da funkciuloj, kiuj kunvenis en Prago, ke ili propravole likvidu la asocion, por ke malamikoj ne misuzu Esperanton kontraŭ la socialismo. Post ekscita tutnokta traktado la funkciuloj lasis sin timigi kaj voĉdonis por la „propravola likvidiĝo“ de la asocio.

Sole Rudolf Burda el Plzeň voĉdonis kontraŭ, kvankam vane, sed li poste fondis Mondpacan Esperanto-Movadon (MEM), eldonis stencilitan informilon *Pacdefendanto*, el kiu evoluis gazeto *Paco*, kies ĉiu numero eldoniĝis en alia

lando. La kluboj povis resti kiel rondetoj ĉe kulturdomoj, al kiuj ili devis transdoni la tutan havaĵon, kaj rajtis eldoni siajn bultenojn. La prema situacio aktivigis junularon, pri kies laboro atestas tiamaj junularaj bultenoj, ĉefe Tagiĝo kaj Fajrero. Gravan signifon akiris someraj kursoj en Doksy, Žimrovice, Rožnov, Chvalatice, Lančov.



Doksy 1953

La ŝtato vidis, ke la agado de esperantistoj ne sufokiĝis, plie reviviĝis ankaŭ la esperantista movado en Sovetunio, tial en 1959 estis permesita Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, kiu eldonis Informojn de ĈSEK (30 numeroj inter 1959-1968).

Nur post la Praga Printempo en 1968 kaj antaŭ enkonduko de la t. n. „politika renormaligo“ sub gvido de Gustav Husák povis renaskiĝi la Esperanto-Asocioj. Ili devis esti du, ĉar Ĉeĥoslovakio dume fariĝis federacio kaj ĉiu el la du respublikoj havis propran ministerion de kulturo, sed la federacia ne ekzistis. Tial devis formiĝi Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Slovaka Esperanto-Asocio subigitaj al tiuj ministerioj. UEA eĉ faris escepton el la regulo, ke ĉiu lando povas esti reprezentita en UEA sole per unu asocio, kaj akceptis ambaŭ memstare.

La elekto de loko por la konstitucia kongreso de ĈEA Esperanto-Asocio estis klara – Brno, loko de la unua esperantista societo kaj ankaŭ de la lasta tutŝtata Esperanto-kongreso en 1950, kiam venis pli ol 1000 kongresanoj (kiel ĉe Ukoj). Pro la sama motivo estis Brno elektita ĉi-jare kiel kongresloko omaĝe al 50-jariĝo de ĈEA.



Kongreso 1950 en Brno

La konstitucia kongreso okazis en la tagoj 29-31 de marto 1969 en la kulturdomo Besední dům (kie nun sidas filharmonio), la fonda traktado realiĝis la 30-an de marto. Partoprenis ĉirkaŭ 400 personoj.



Prezidantaro de la konstitucia kongreso

Estis akceptita statuto, fonditaj sekcioj kaj elektitaj unuaj honoraj membroj (*Anna Barochová, Josef Fousek, Theodor Kilian, Jiří Kořínek, Miloš Lukáš, Tomáš Pumpr, František Pytloun, Vilibald Scheiber, Julie Šupichová kaj Jaroslav Šustr*).



Delegitoj de la konstitucia kongreso

Plie estis elektita nova estaro kun Josef Vitek kiel prezidanto kaj akceptita la Programdeklaro de ĈEA kaj Programdeklaro de junulara sekcio - detale en Starto 1/2009 kaj en la retejo

<http://www.esperanto.cz/cs/co-to-je-esperanto/historie/udalosti/sjezdy-a-konference/ustavujici-sjezd-1969>

Nia ĉi-jara kongreso, jam la 17-a, okazos ankaŭ en Brno inter la 17-20 de oktobro (ĵaŭdo-dimanĉo) 2019 en la Mezlernejo de Informadiko, strato Čichnova 23.



Miroslav Malovec

# Raporto de la elektokomisiono de ĈEA

## Zpráva volební komise ČES

*Ĉar la rajton elekti novajn komitatanojn de ĈEA havas ĉiuj membroj de ĈEA, do ankaŭ la komencantoj, ni daŭrigos ĉeĥe por havi certecon, ke ĉiuj membroj komprenas.*

V rámci jednání konference ČES v Benešově u Prahy byla zvolena volební komise ve složení Libuše Dvořáková, Jana Melichárková a Petr Chrdle. Komise hned začala pracovat, přitom se řídí Stanovami a Volebním řádem ČES. Odkazy na oba dokumenty najdete na webu [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) v sekci Organizace → Český esperantský svaz → Co je ČES (zcela dole).

Hlavní činnost komise spočívá v hledání vhodných kandidátů na předsedu svazu a ve spolupráci s ním (s nimi) vyhledávat vhodné kandidáty i na členy výboru.

Volby se budou konat během sjezdu ČES v Brně 17–20. října 2019. Kandidovat a být zvolen může každý člen ČES starší 18 let. Kandidáti na předsedu si mohou sestavit svůj tým i samostatně bez pomoci volební komise, musí však nejpozději 40 dnů před volbami volební komisi předložit závaznou kandidátní listinu zahrnující stručné představení svého programu a priorit a jména 4–6 předjednaných kandidátů do výboru včetně funkcí, které mají zastávat.

Sejde-li se více kandidátek, volební komise seznámí všechny kandidáty na předsedu s ostatními protikandidáty. Úkolem není vyvolat řevnivost či vzájemný tlak, ale naopak pokusit se kandidátky optimalizovat a vzájemně obohatit.

Zároveň je však komise vázána mlčenlivostí o plánech jednotlivých kandidátů na předsedu (jména a funkce pro výbor, obsah a priority činnosti; takové informace si mohou sdělovat jen kandidáti navzájem a dobrovolně).

Komise nemá právo některou z kandidátek zamítnout a nepředložit sjezdu. Má však právo před samotnou volbou shrnout sjezdu své poznatky při tvorbě kandidátek a nejvýše 2 doporučit.

Komise už má vytipovaného kandidáta na předsedu i kandidáty na členy výboru, přesto, jak vyplývá z citovaného volebního řádu, je stále možno se o kandidaturu ucházet. Komise ráda pomůže každému z nových kandidátů na předsedu, stejně tak zprostředkuje kontakt zájemců o práci ve výboru a kandidátem, resp. kandidáty na předsedu.

Proto vyzýváme zájemce o vedení svazu, ev. o jinou funkci ve výboru, aby se přihlásili některému členu komise. Pokud někdo chce kandidovat někoho jiného než sebe, je potřeba s ním mít předjednaný souhlas a teprve pak ho může doporučit.

Předem děkujeme případným zájemcům podílet se na vedení Českého esperantského svazu v příštích třech letech.

*Libuše Dvořáková,  
dvor.libuse@seznam.cz*

*Jana Melichárková,  
melicharkova8@seznam.cz*

*Petr Chrdle, chrdle@kava-pech.cz*

**Výsledek hospodaření ČES za rok 2018, plán na rok 2019  
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).**

<b>Příjmy</b>	<b>pl.2018</b>	<b>sk.2018</b>	<b>pl.2019</b>	<b>Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2018</b>	
Příspěvky na běžný rok	19 000	12 409	13 000	<b>peněžní prostředky</b>	
Příspěvky dobrovolné	1 000	3 170	1 000	pokladna korunová	910
Příspěvky na budoucí rok	25 000	24 279	25 000	pokladna eurová	0
Dary členů	10 000	4 510	10 000	ceniny	2 154
Dary nečlenů	2 000	0	2 000	účet Fio	100
Dotace	10 000	5 000	10 000	účet Fio spořicí	459 550
Starto předplatné	1 000	281	0	<b>peníze celkem</b>	<b>462 714</b>
Konference a sjezdy	70 000	62 956	100 000	<i>změna vůči 31.12.2017</i>	<i>-1 500</i>
Činnost klubů a sekcí bez PS	2 000	0	2 000	<b>investice</b>	
Muzeum	0	21 164	0	podílové listy	178 388
Libroservo	4 000	14 033	4 000	<b>investice celkem</b>	<b>178 388</b>
Kurzy esperanta	4 000	400	2 000	<i>změna vůči 31.12.2017</i>	<i>-8 749</i>
Příspěvky UEA ind. běžný rok	5 000	9 405	0	<b>pohledávky</b>	
Příspěvky UEA ind. bud. rok	12 000	20 393	0	UEA subkonto	1 848
Platby UK na běžný rok	5 100	8 619	0	<b>pohledávky celkem</b>	<b>1 848</b>
Platby UK na budoucí rok	40 000	25 252	0	<i>změna vůči 31.12.2017</i>	<i>-11 372</i>
Platby ILEI a pedagog. komise	900	600	900	<b>ostatní majetek ČES</b>	
Úroky z účtů	200	497	500	drobný majetek v ceně pořízení	208 567
Virtuální adresa	200	0	200	knihy v libroservu (odhad)	9 874
				<b>ostatní majetek ČES celkem</b>	<b>218 441</b>
<b>Příjmy celkem</b>	<b>211 400</b>	<b>212 968</b>	<b>170 600</b>	<i>změna vůči 31.12.2017</i>	<i>2 878</i>
				<b>závazky</b>	
<b>Výdaje</b>	<b>pl.2018</b>	<b>sk.2018</b>	<b>pl.2019</b>	platby pro UEA	2 153
Starto tisk	20 000	17 845	17 000	<b>závazky celkem</b>	<b>2 153</b>
Starto distribuce	16 000	11 811	17 000	<i>změna vůči 31.12.2017</i>	<i>-4 967</i>
Konference a sjezdy	70 000	64 136	100 000	<b>účelově vázané prostředky</b>	
Činnost klubů a sekcí bez PS	5 000	2 500	5 000	fond Tilio	27 392
Administrativa, kancel. pořeby	2 500	2 364	2 500	fond ediční	12 660
Jízdné funkcionáři	5 000	903	5 000	fond Cigno	22 697
Přísp. na stravné za schůze	700	300	700	sekce nevidomých	20 279
Muzeum	25 000	41 667	20 000	klub Mladá Boleslav	16 321
Libroservo nákup zboží	4 000	2 050	4 000	klub Ratíškovice	8 246
Libroservo poštovné a balné	600	0	300	pedagogická komise	4 949
Kurzy esperanta	200	0	200	klub Havířov	2 622
Příspěvky UEA ind. běžný rok	8 000	9 405	0	klub Písek	2 550
Příspěvky UEA ind. bud. rok	12 000	20 393	0	klub Česká Lípa	2 155
Platby UK v běžném roce	5 100	8 619	0	klub Benešov	1 482
Platby UK na budoucí rok	40 000	25 252	0	klub Tábor	1 178
Platby ILEI a pedagog. komise	800	255	800	klub Vítkovice	747
Kolektivní členství v UEA	1 000	1 200	1 500	klub Opava	655
Kolektivní členství v EEU	1 300	1 277	1 300	ost. kluby a sekce bez pr. os.	2 029
Blahopřání, kondolence	1 000	922	1 000	<b>celkem</b>	<b>125 962</b>
Poplatky	50	0	50	<i>změna vůči 31.12.2017</i>	<i>-11 915</i>
Daň z úroku	50	94	100	Pozn:	
Nový majetek	16 000	14 861	30 000	bylo pořízeno vybavení kuchyňky,	
Závazky k sam. klubům	4 200	4 240	0	dřez, kuchyňská linka, ohřívač vody	
Ceniny	1 000	928	0	a baterie, byly zřízeny rozvody vody	
				a odpadu	
				v celkové hodnotě 14861 Kč	
<b>Výdaje celkem</b>	<b>239 500</b>	<b>231 022</b>	<b>206 450</b>		

## EKSPOZICIO PRI JIŘÍ HARCUBA

En la Artmetia muzeo en Prago inter la 17-a de novembro 2018 kaj la 30-a de aprilo 2019 okazas kameretosa ekspozicio SKLO & KOV (VITRO & METALO), dediĉita el neĝisvivita 90-jariĝo de la tutmonde rekonata vitroartisto kaj medalisto [Jiří Harcuba](#) (6.12.1928 – 26.7.2013). Inter la ekspoziciaĵoj troviĝas ankaŭ vitromedaliono de Komenio kaj medalo el 1987 dediĉita al d-ro Zamenhof.



J. Harcuba estis i.a. esperantisto kaj membro de ĈEA. Lia verkaro estis prezentita ankaŭ dum la ekspozicio "Esperanto kaj muzoj" en la Esperanto-Muzeo en Svitavy en la jaro 2013.

La ekspozicieto situas en la 4-a etaĝo atingebla per lifto kaj estas SENPAGA. Adreso de la muzeo estas ul. 17. listopadu 2, Praha 1.

Vi povas samtempe ĝui belegan internan ornamon de la nove rekonstruita konstruaĵo.

Retejo: <http://www.upm.cz>

-padv-

## Sternenhoch premiita

Dimanĉe la 17-an de marto 2019 en la praga *Teatro sub Palmovka* estis solene transdonitaj premioj de teatra kritiko por la jaro 2018. Komponisto **Ivan Acher** ricevis premion por la plej bona muziko (esperantlingva opero *Sternenhoch*) kaj kantistino **Tereza Marečková** (kiu ludas en *Sternenhoch*) estis proklamita kiel talento de la jaro 2018.

Slovakaj esperantistoj nun traktas kun la artistoj pri ebleco prezenti la operon en Slovakio, ekzemple en Nitra dum SES.

-mm-

## Lanĉo de Zamenhof Křest Zamenhofa

Na straně 27 je zpráva o vyjití publikace A. Korženková *L. L. Zamenhof* v překladu Jindřicha Košťálka. Kniha už je sice v knihkupectvích, ale její křest, i když o něco opožděn, proběhne v budově Polského institutu v Praze (Malé náměstí 1, vchod z Karlovy 27) až 30. května od 17:00 hodin. Představeny budou i další novinky nakladatelství KAVA-PECH, druhé vydání *Home en senhomeco* M. Stuppniga, dále *La gregoria kalendara reformo* (viz str. 26), ale i připravovaná publikace Vlastimila Novobilského *Jaroslav Novobilský: Muž, který povýšil morální principy nad strach ze smrti*, která je v konečné fázi předtiskové přípravy a vyjde koncem dubna. Knihu představíme v příštím čísle Starta. Křest doprovodí prodejní výstavka vybrané produkce nakladatelství KAVA-PECH.

-pch-



# La 13-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

2.3. - 9.3.2019

Jam de pluraj jaroj sinsekve okazas la Mediteranea Esperanto-Semajno en ĉemara loko en *Les Issambres*, kie tiutempe floras mimozoj. Ĉi-jare en la bela feriejo *Vacanciel* kuniĝis 93 geesperantistoj el dek landoj.



Posttagmezan sabaton bonvenigis nin per aperitivo s-ro Silvain Ceccoto, la estro de la feriejo *Vacanciel*.

Tuj la sekvan tagon komenciĝis instruado de Esperanto en kvarnivelaj kursoj. Pri komencantoj okupiĝis Christine Graissaguel, progresantojn instruis Michel Dechy laŭ la libroj de Tinĉjo. Katerina Arbekova el *Novosibirsk* uzis ludmetodan instruadon kun multaj bildoj, proverboj kaj mallongaj rakontoj. La plej spertajn lernantojn instruis Emnuele Regano el Italio. Liaj filozofiaj prezentoj kaj debatoj pri diversaj temoj, estis pripensigaj kaj nesolveblaj. Temis ekzemple pri problemo de etiko, justeco, perforto, vegetarismo kaj veganismo.

Posttagmezoj estis dediĉitaj al ekskursoj kaj al agrablaj promenoj en la ĉirkaŭaĵo. Iuj profitis liberan tempon por legi, komputili aŭ ludi kartojn.

Dum unu posttagmezo ni vizitis ekspozicion pri orkideoj en *Roquebrune-sur-Argens* ĉe la familia entrepreno de

Michel Vacherot, kiu funkcias ekde la jaro 1886-a.

Aliajn tagojn ni promenis ĉe la lagetoj *Villepey*, vizitis la urbon *Fréjus* kaj *St. Raphaël*. Interesa estis ekskurso al *Tourves*, kie troviĝas *Musée des Gueules Rouges*. Tie ni ricevis kaskojn kaj promenis en artefarita instalaĵo imitanta la baŭksit-minejon.

Vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programoj. Katerina Arbekova prezentis al ni sian ŝatatan landon Siberion. Ĉe la fino ŝi organizis nekutiman kvizon pri ĝi. Michel Dechy parolis pri "La humuro en la verko de Hergé (*Herĵe*)". La temo de Manuele Regano traktis "Arton kaj filozofiojn". Nina Korĵenevskaja prezentis al ni la urbon Ufa, kiu situas en Rusio apud Uralo kaj poste rakontis pri la folkloro en Rusio. Ege interesa estis la filmo de Jean-François Cousineau pri "Ekspedicio en Suda Afriko". Dum la vizito de Namibio, Bocvano kaj Zimbabvo li spertis eksterordinarajn travivaĵojn kun sia edzino kaj aliaj partoprenantoj.

La 8-an de marto gesinjoroj Prezioso alportis bukedojn da mimozo plukitajn en ilia ĝardeno kaj ĉiu virino ricevis branĉeton por memorigi la Internacian Tagon de Virino.

Lastan vesperon la hotelo proponis aperitivon al la gastoj. Niaflanke okazis adiaŭa vespero kun tombolo kaj diversaj artaj prezentoj. La kursanoj ludis diversajn teatraĵojn, deklamis kaj la ĥoruso sub la gvido de Bernard Bigonnet kantis kelkajn esperantajn kantojn. Dancado en akompano de akordiona muziko de la fratinoj Prezioso daŭris ĝis noktomezo.

**Liba Gabalda**

## Invitilo al tradicia maja renkontiĝo

EK Ŝumperk invitas vin elkore al sia tradicia renkontiĝo, kiu okazos la 11-an de majo ĉi jare en Žárová. Ni renkontiĝos je la 9:45 ĉe la kastelo en Velké Losiny, kiam al samnoma trajnhaltejo venas trajno el direkto Zábřeh. Iu el ni atendos vin ĉe la trajnhaltejo. El Losiny ni veturgos vin al Žárová, kie ni vizitos lignan preĝejon el 17-a jarcento. Plia programo okazos en loka gastejo, kie estos ankaŭ komuna unueca tagmanĝo. Eble estos ankaŭ surprizo, do venu!



## Membrarkunsido de EK Česká Třebová

La 13-an de marto okazis membrarkunsido de EK Česká Třebová. Prezidanto de la klubo sinjoro Kovář konatigis nin kun laboro de la klubo dum lasta jaro, Ilonka Bauerová kun planoj por tiu ĉi jaro. Multaj anoj de la klubo estas fervojistoj, do sinjoro Kovář informis ankaŭ pri aktivecoj de ĉeĥaj e-fervojistoj kaj de IFEF, ekzemple kun pasinta fervojista kongreso en Vroclavo kaj kun

tio, ke en la jaro 2021 okazos IFEF kongreso en Ĉeĥio, la urbo estas ankoraŭ decidata.



Post ankaŭ necesa kontrolado de klubaj financoj, salutis delegitoj de kluboj en Svitavy kaj Ŝumperk kaj de ĈEA, parolis pri ties aktivecoj kaj invitis al planitaj aranĝoj. Oni parolis pri multaj interesaj aferoj, ne nur kongresoj kaj E-aranĝoj, sed ankaŭ ekz. pri opero en Esperanto Sternenhoch kaj filmfestivalo Teo kaj Amo kun ebleco gustumi originalan ĉinan manrikoltatan teon. Poste estis refreŝiĝo proponita de la klubo kaj projektado de filmetoj. La klubanoj certe ĝojigos vin per informo, ke ankaŭ ĉi jare ni povas antaŭĝoji al Esperanta Silvestro en Česká Třebová, denove la 29an de decembro.

*Libuše Hýblová*

## UEA INAŬGURAS ĈE LA RETA REVUO ESPERANTO RUBRIKON PRI MONDA KULTURO: PARTOPRENU!

Principe la rubriko aperos ekskluzive en la reta versio de Revuo Esperanto kaj jam eblas legi la unuan kaj duan artikolojn:

- (1) [https://revuoesperanto.org/kafo\\_finnlando](https://revuoesperanto.org/kafo_finnlando)
- (2) [https://revuoesperanto.org/korea\\_alfabeto](https://revuoesperanto.org/korea_alfabeto)

*Gazetara Komunikado de UEA*

## INFORMOJ (PRI kaj) EL UEA

En la jaro 2018 estis en Ĉeĥio 61 individuaj membroj de UEA kaj en la jaro 2019 tio estas ĝis nun 41 individuaj membroj. Ĉu ni atingos minimume la saman nombron ĉi-jare kiel lastjare? Eble vi demandas, kial aliĝi, do ni prenas al vi kelkajn informojn pri kaj el UEA. Krom tio, ke vi povas ĝui rabaton je partoprenkotizoj por Universalaj kongresoj kaj en libroservo de UEA, vi ricevados la Revuon ESPERANTO aŭ papere aŭ rete (laŭ via aliĝkategorio).

Ke vi neniam vidis ĝin aŭ jam longe ne? Do sciu, ke ekde la aprila numero 2017 havas la revuo unuafoje en la historio de la Revuo Esperanto oficiale du redaktorojn, la geedzan paron Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova. De tempo al tempo UEA ebligas al ĉiuj esperantistoj, ne nur anoj de UEA, elŝuti senpage numeron de la revuo. Tiam eblecon vi havas ankaŭ nun en la retejo <https://revuoesperanto.org>, kie estas senpage elŝutebla la decembra numero de la Revuo Esperanto, la plej renoma periodaĵo en Esperantujo, aperanta jam la 112-an jaron. Provu kaj legu pri multaj ne nur gravaj, sed ankaŭ interesaj aferoj.

Plia projekto de UEA estas la fondaĵo “Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich”, kies celo estas subteni kaj pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj. La Biblioteka Apogo Bachrich estis starigita de UEA en 2014 danke al la malavara donaco de la gefiloj de gesinjoroj Bachrich. Tiu ĉi fondaĵo subtenas ekde tiam Esperanto-bibliotekojn ne ricevantajn financan subtenon de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco, kaj kiuj tial riskus ne havi sufiĉe da rimedoj por adekvate pligrand-

igi siajn kolektojn. Ĉiujare venas alvoko por peti la subvencion, kiun en la jaro 2018 kaptis 15 bibliotekoj. Ĉi-jare estis ĉiuj petoj pri subteno tute aŭ parte plenumitaj. Inter tiuj estis ankaŭ subvencipeto de biblioteko de Esperanto-muzeo en Svitavy, kiun preparis Pavla Dvořáková kun Miroslav Malovec, al kiuj apartenas nia danko. UEA laboradas por krei pli kaj pli da similaj ebloj por plifortigi la Esperanto-kulturon, ekz. Fondaĵoj Afriko, Ameriko kaj Kultura Evoluiĝo.



Kaj ankoraŭ unu novaĵo el UEA: La 19an de januaro ĉi-jare aperis nova retejo de UEA. Ĝia nomo estas uea.facila, kaj ĝi estas videbla ĉe: <https://uea.facila.org>. La ĉefredaktoro estas Anna Löwenstein kiu jam havas tutan reton de kunlaborantoj, inter kiuj ne mankas Emilio Cid, estrarano de UEA, kiu subtenis la projekton ekde la komenco. La projekton subtenis ankaŭ ESF (kiu subtenis ankaŭ ekeston de nia muzeo en Svitavy). Ties subvencio necesis por ricevi la helpon de profesia programisto. Celo de la retejo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo, do ĝi estas taŭga por komencantoj, lernantoj

kaj viaj kursoj. Ĝi enhavas mallongajn novaĵartikolojn, legaĵojn, filmetojn, liston de ventontaj aranĝojn kaj multon pli, kio estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA. La enhavo certe estas interesa por ĉiuj, ne nur por komencantoj, do enrigardu. La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de Kontakto, kiu nun estis reviziita kaj vi povas trovi ĝin ĉe: <https://uea.facila.org/vortlisto/>.

Kaj lasta informo por nun estas pri Gazetaraj komunikoj de UEA, kiuj portas informojn el UEA kaj kiuj helpis pri verkado de tiu ĉi artikolo. Al Gazetaraj komunikoj vi povas aboni ĉe: <https://uea.org/aktuale/komunikoj> kaj ricevadi ilin rekte je via retadreso aŭ vi povas legi ilin rekte je retpaĝaro de UEA je supre menciita paĝo.

*Libuše Hýblová*

## UEA SERĈAS NOVAN PREZIDANTON

*En julio 2019 okazos elektoj por la nova Estraro de UEA por la periodo 2019-2022. Certe vin interesos, laŭ kiuj kriterioj estas elektata la prezidanto.*

**Kandidato por prezidanteco** estu homo kun: Strategia aliro – Elstaraj publikparolaj kapabloj – Diplomacia kaj reprezentanta personeco – Sperto en gvidado de volontula organizo – Sperto en la Esperanto-movado – Sperto en konfliktsolvado – Laboremo – Fleksebleco – Scipovo de Esperanto je almenaŭ C1-nivelo.

Kandidato kiel estrarano de UEA devas esti Komitatano. Se aktivulo volas kandidatiĝi por la Estraro de UEA, tiu devos unue elektiĝi kiel Komitatano de UEA (Komitatano A, B aŭ C).

*laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## MURDO de ESPERANTISTINO

*Rosane Santiago Silveira*, aktivulino pri homaj rajtoj kaj medio, estis perforte torturita kaj murdita en la urbo Nova Viçosa (Bahia, Brazilo) la 29an de januaro. Ŝi luktis por ĉesigi la akaparadon de teroj, fare de la plantejoj de eŭkalipto en la protektata media rezervejo Ilha de Barra Velha.

[Ekstrakta rezervejo estas protektata areo](#), kie la rezidantaj familioj vivtenas sin per naturaj produktaĵoj el la arbaro. Tiuj aktivaĵoj helpas al konservado de tuteco el la arbaro.

Laŭ la filo de Sinjorino Silveira, *Tuian Santiago Cerqueira*, Rosane ricevis multajn minacojn de morto.

## maldekstra # I

Maldekstrula germanlingva gazeto elektis esperantlingvan titolon



<https://freihandelpressespiegel.com/2018/12/23/maldekstra-1/>

## 70-jariĝo de ILEI

2019 estos la jaro de la jubileo de ILEI – ĝi iĝis 70-jara! Gratulojn al ĉiuj ĝiaj membroj kaj dankojn al ĉiuj, kiuj portis ĝin dum tiom da jaroj! Ni deziru al nia Ligo vivi plu kaj plu, prosperi kaj ĝui sukcesojn en tutmonda disvastigo de Esperanto kaj efika instruado de la lingvo!

## Seminario „Eŭropaj fervojoj“ en Pardubice

La 26-an de februaro 2019 okazis en Universitato Pardubice unutaga seminario kun temo - Eŭropaj fervojoj, organizita de Ĉeĥa Fervoja Esperanto Asocio (ĈeFEA) kunlaborante kun Internacia Fervoja Esperanto Federacio (IFEF) kaj Universitato de Pardubice, Trafika fakultato. La eventon subtenis Landa asocio de FISAIC.



Malfermon de la seminario faris prezidantino de IFEF s-ino Rodica Todor. Celo de la okazaĵo estis prezenti al studentoj interesajn temojn pri fervojo kaj samtempe montri al ili eblecojn de Esperanto en prilaboro de fakaj teknikaj tekstoj el diversaj landoj kaj ilian publikigon je unulingva platformo. Unuopajn prelegojn kaj prezentaĵojn preparis fakuloj el Germanio, Italio, Danlando kaj Ĉeĥio. La temoj estis elektitaj tiamaniere, ke ili priskribu diversajn areojn de relvoja trafiko – tram- kaj region- trafikon, konstruadon de fervojaj stacioj, grandajn trafikprojektojn, diagnostikajn instalaĵojn de fervojaj ekipaĵoj kaj ankaŭ sistemon de kreado de teknikaj normoj kaj standardoj en Eŭropa Unio.

La seminarion partoprenis ne nur studentoj-neesperantistoj de la Universitato, sed ankaŭ interesuloj – esperantistoj.



Enkadre de la restado en universitata medio okazis ankaŭ estrarkunveno de IFEF, dum kiu ĝiaj membroj pritraktis krome aliaj aferoj ankaŭ planojn por daŭrigo de la projekto, kiu havis en Pardubice sukceson.



Fine de restado de la IFEF estraro en Pardubice, subskribis dekanon de Trafika fakultato, Universitato Pardubice, doc. Ing. L.Švadlenka, Ph.D, prezidantino de IFEF kaj prezidanto de ĈeFEA kontraktan pri reciproka kunlaboro.



*Ing. Ladislav Kovář*

## Rememoro pri Kei Kurisu okaze de la 10-a datreveno de lia forpaso

En la jaro 2009 mortis en la aĝo de 99 jaroj elstara japana bohemisto Kei Kurisu. Li merite estis prezentita al japanaj legantoj verkoj de Karel Čapek, Jaroslav Hašek, Karel H. Borovský, Arnošt Lustig, Jaroslav Seifert, Božena Němcová kaj multaj aliaj. Per ĉi tiu artikolo mi volas rememorigi tiun admirindan personon, honoran membron de la Ĉeĥa-Japana Asocio, kaj ankaŭ honoran membron de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Universala Esperanto-Asocio, sed precipe modestan kaj nekredible laboreman homon kaj mian proksiman amikon.



**K. Kurisu en Kojetín 11.12.1960**


Parenteze mi klarigu, kial mi skribas pri Kei Kurisu, kvankam oni pli ofte legas pri Kurisu Kei. En Japanio oni metas la propran nomon post la familia nomo, do skribas pri Kurisu Kei, tamen mi preferas en la ĉeĥa kaj en esperanta tekstoj konservi la kutimon de tiuj lingvoj, ke la propra nomo Kei antaŭu la familian nomon Kurisu.

### Nia unua renkontiĝo

En la jaro 1994 mi prelegis en Japana Esperanto-Instituto en Tokio pri la paca disiĝo de Ĉeĥoslovakio. Dum la prelego mi rimarkis maljunulon, kiu ne nur tre atente sekvis ĉiun mian vorton, sed eĉ diligente skribis por si notojn. Kiam mi finis kaj sugestis diskuton, li havis demandojn pri multaj konkretaĵoj, de kio mi eksciis, ke li komprenas la situacion en novaj du respublikoj, Ĉeĥio kaj Slovakio, pli bone ol plejparto de ĉeĥoj kaj slovakoj. Post la fino li venis al mi kaj modeste prezentis sin *Mi estas Kurisu Kei*. Tiel komenciĝis nia unua interparolo, kiu daŭris sufiĉe longe.

Pri la elstara japana bohemisto kaj esperantisto Kei Kurisu mi kompreneble sciis, sed eĉ en sonĝo mi ne supozis, ke mi iam havos la honoron paroli kun li persone kaj ke nin baldaŭ ligos proksima amikeco. Miajn simpatiojn li ekhavis, jam pli frue ol li alparolis min, pro la atentema sekvo de mia prelego. Kaj kiam mi havis bonŝancon ekkoni lin pli pro-

ksime, lian modestecon, elanon kun kiu li planis, kion ĉion li devas ankoraŭ verki, traduki kaj organizi, mia admiro iĝis pli kaj pli granda. Tiam mi ekkomprenis, kiel juna povas resti homo eĉ post la okdekjariĝo, kiam li okupiĝas pli pri siaj estontaj planoj ol pri rememoroj.



### La vivo de Kei Kurisu

Kei Kurisu naskiĝis la 18-an de julio 1910 proksime de Osaka en la familio de vilaĝa kuracisto. Jam kiam li finis mezlernejon, li elstaris en la scipovo de la angla lingvo; krome li lernis la francan kaj la rusan. Li planis dediĉi sin al la lingvoj profesie, sed pro la parol-handikapo li pri tio rezignis kaj provis karieron de poeto. Dume li laboris en fabriko. Ĉar li suferis pro tuberkulozo, li frekventis kuracrestadon en sanatorio. Tie li renkontiĝis kun esperantisto, kiu ekinterestigis lin pri Esperanto. La novan lingvon li rapide kaj perfekte ellernis.

Ekde sia juneco havis Kei Kurisu socialisman konvinkon kaj legis precipe proletan literaturon. Li profunde engaĝiĝis en proleta kultura movado, ĉefe kiel pub-

licisto kaj redaktoro. Tial lin ofte persekutis la sekreta polico Toddó (analoge al la germana Gestapo) kaj kelkfoje li estis arestita. En la jaroj 1937–1939 li pasigis en malliberejo preskaŭ du jarojn. Tie al lia tuberkulozo aldoniĝis pliaj malsanoj, precipe beribero kaj skabio.

Malgraŭ multaj malfacilaĵoj li travivis la militon kaj post ĝi li povis finfine utiligi la lingvajn sciojn por sia vivtenado profesie. Komence kiel kontakt-tradukisto de la radio Osaka kun la cenzura oficejo de la usona armeo, pli poste ankaŭ kiel tradukisto de arta literaturo, kultura kaj literatura korespondanto, kaj recenzisto.

### *Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo*

Kei Kurisu apartenis al konvinkitaj japanaj komunistoj, kio influis ankaŭ la elekton de la tradukataj verkoj. Ilia listo estas longa, la elekton mi enmetas aldone. Sed kiel li konfesas en sia verko *Co mi dala ĉeská literatura* (Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo, KAVA-PECH, 1996), la kono de la situacio en Ĉeĥoslovakio post la komunista puĉo en la jaro 1948 malfermis al li la okulojn kaj li nuligis sian membrecon en la Komunista partio de Japanio. Lin ŝokis precipe tio, ke la komunisma reĝimo cenzuris ne nur la verkojn de Hašek, ekzemple la Aventurojn de la brava soldato Ŝvejek, sed eĉ sian heroon Julius Fučík en lia ĉefverko Raporto en la pendumila maŝo. Tiun ekkomprenon, kiel li priskribas detale en sia pli supre menciita libreto, li gajnis helpe de Esperanto, kiam li komparis la

librojn en Esperanto laŭ la originaloj kun la cenzuritaj versioj, kiujn disponigis al li la ĉeĥoslovaka ministerio pri kulturo. Jene li mem resumis tion: *Pro sia proleta konvinko mi lernis Esperanton kaj merite al Esperanto kaj la ĉeĥa literaturo mi lernis, kia estas la reala komunismo.*



*En la sidejo de la Ĉeĥa-Japana Asocio*

### **Kelkaj neforgeseblaj travivaĵoj**

Ene de sia lasta vizito de Prago en la jaro 1996 gastis Kei Kurisu unu semajnon post la fino de la UK ĉe mi, kio estis perfekta okazo eĉ pli bone konatiĝi kaj amikiĝi dum niaj vesperaj interparoloj. Kiam ni planis, kion ĉion li volus viziti, la listo de invitoj kaj de liaj interesoj abundis. Mi akompanis lin ekzemple en la Ĉeĥan-Japanan Asocion aŭ al la Praga kastelo en la oficejon de la ĉeĥa prezidento Václav Havel. Tie altiris lian atenton ĉefe la prezidenta laborĉambro kun la motivo de toriĵo (tradicia japana enirejo antaŭ ŝintoa sanktejo) sur la muro ĉirkaŭ la enirpordo, rekte kontraŭ la labortablo de la prezidento. Li tre bedaŭris, ke li ne povis renkontiĝi kun Václav Havel persone, ĉar li estis tiu-

tempe eksterlande. Sed kun lia konsilanto, profesie japanologo, li tre vigle diskutis (sed en la japana, do mi ne komprenis).

Kiam ni planis, kion viziti ekster Prago, li elektis la monteton Říp (la loko, kien laŭlegende venis la prapatro Ĉeĥo kun sia popolo kaj kie li decidiĝis ne plu migri, sed eksetli en la fekunda regiono) kaj la fifaman koncentrejon Terezín, do du lokojn el la ĉeĥa historio, pri kiuj li bedaŭris, ke li ne povis ilin viziti dum siaj antaŭaj vizitoj de Ĉeĥoslovakio. En Terezín li ŝvitigis la ĉiĉeroninon per siaj demandoj kaj rimarkoj, de kiuj klaris, ke li konas la historion de Terezín eble pli bone ol ŝi. Ofte ŝi post sia respondo aŭdis „*Sed tiel ja ne povis esti, ĉar ...*“ kaj ŝi devis konfesi, ke Kei Kurisu pravas.

Mi devas aldoni unu travivaĵon, kvankam ne mian propran, sed kiu estas por Kei Kurisu tipa. Nia komuna amiko Jakvo Schram el Belgio vizitis lin ne longe antaŭ lia morto en pensiono por maljunuloj kaj atendis en halo. Kiam Kei Kurisu venis al li kaj invitis lin al sia loĝejo, li direktis siajn paŝojn aŭtomate al lifto, sed ne sukcesis. *Se mi uzus la lifton, mi jam verŝajne ĉi tie ne plu estus*, li aŭdis. *Vi akompanu min surŝtupare.* Do ili supreniris piede kaj Jakvo esperis, ke Kei loĝas en la unua etaĝo. Sed ho ve! Ili malrapide, kun pluraj paŭzoj, supreniris en la kvaran!



## Adiaŭigo

Lastan fojon mi persone renkontis mian amikon Kei Kurisu ene de la UKo en Jokohamo en aŭgusto 2007. Pensante pri lia aĝo, mi supozis, ke mi vidas lin lastan fojon, kio bedaŭrinde plenumiĝis. Mi do strebis avide ĉerpi kiom eble plej multe el lia vivoelano kaj konservi ĉi tiun lian heredaĵon laŭeble longe. En sia 97-jariĝo li apenaŭ vidis, tre malforte aŭdis, malrapide moviĝis, sed lia intereso pri novaĵoj de mia eldonejo kaj pliaj novaĵoj el Ĉeĥio tre pozitive surprizis min. Kiam mi finfine demandis, kiel li fartas, mi atendis, kiel kutimas ĉe maljunuloj, listigon de liaj malsanoj kaj problemoj. Sed tute ne! Li komencis paroli pri tio, kion li momente prilaboras kaj kion li ankoraŭ volas fini, do precize tion, kion mi admiris ĉe li jam dum nia unua renkontiĝo.

Proksimume unu jaron pli poste li ne plu reagis al miaj retmesaĝoj, nek al leteroj, kaj fine mi eksciis, ke la 18-an de aprilo 2009 li adiaŭis nin por ĉiam. Plej laste li ektradukis la verkon de J. Hašek *Dějiny strany mírného pokroku v mezích zákona* (Historio de la partio de modera progreso en la limoj de leĝaro), kiun li ne plu sukcesis fini ...

## Elektio de la tradukoj de Kei Kurisu eldonitaj en Japanio

La listo estas trasprenita de la eseo Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo, do enestas nur la tradukoj eldonitaj antaŭ la jaro 1996. Pro koncizeco ne estas indikitaj eldonejoj kaj pliaj referencoj, nek estas envicigitaj verkoj

tiutempe jam tradukitaj, sed ĝis tiam ne eldonitaj.

**Karel Čapek:** Rakontoj de unu poŝo (1960, 1976); Milito kontraŭ salamandroj (1970, 1974, 1978); La viro, kiu kapablis mensogi (1971); R.U.R., Ŝtelita kakto + Kolekto de filatelaĵoj (1978); Spuroj (1988); Rakonto pri kasrompulo kaj bruliganto (1988); R.U.R. + Blanka Malsano + 6 esejoj (1992); Afero de Selvin (1994)

**Jan Drda:** Muta barikado (1952)

**Julius Fučík:** Raportaĵo skribita en pendumila maŝo + 11 artikoloj (1952); reldono de Raportaĵo + 12 leteroj el malliberejo + kelkaj pliaj raportoj kaj artikoloj (1962, 1977)

**Karel Havlíček Borovský:** Bapto de sankta Vladimiro (1960)

**Jaroslav Hašek:** Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito (1962, 1963); reldono kun la rememoroj de Josef Lada Kiel mi desegnis Ŝvejkon (1972, 1978)

**Arnošt Lustig:** Preĝo por Katarina Horovitz + Manĝopeco (1967)

**Božena Němcová:** Avineto (mallongigita versio por junularo, 1956; kompleta traduko + tri leteroj de B. Němcová, 1972)

**Jan Neruda:** Al Panjo + Nia horloĝo + Konsolo (1960); Kien kun ĝi? (1963)

**Josef Nesvatba:** Stultulo el Kseneminde (1971)

**Stanislav Kostka Neumann:** Pri la batal-kampo en ni (1960)

**Jaroslav Seifert:** La monto Říp en fenestro + Ĉe unu tombo en Olšany-Tombejo (1960)

**Olga Scheinpflugová:** Kvaranteno (1975)

**Jiří Weil:** La vivo kun stelo (1967)

**Jiří Wolker:** Soleco + Epitafo + Pilgrimulo meditas (1960)

*Petr Chrdle*

## Jarkunveno en Svitavy

Sabate la 23-an de februaro okazis jarkunveno de klubanoj en Svitavy. Kunvenis 22 esperantistoj, krom la lokaj klubanoj ankaŭ gastoj el Česká Třebová, Moravské Budějovice, Polička, Pardubice, el Brno venis komitatano de ĈEA Miroslav Malovec, kun kiu la klubo kunlaboros ĉe preparo de nova ekspozicio en la Esperanto-Muzeo aŭtune 2019. La kluba prezidantino Libuše Dvořáková priskribis aranĝojn okazintajn pasintjare – sume 34 (kun lumbildoj). La plej grava estis la festo de la 85-jariĝo de la klubo en Svitavy. Ŝi prezentis ankaŭ planon por la nuna jaro, kun granda internacia renkontiĝo en Svitavy.



Enkadre de la programo realiĝis ankaŭ „bapto“ de kompakta disko kun bitlibro *Patrino* de Otokar Březina, kiun proprate preparis kaj lanĉis Viktor Dvořák. Petr Chrdle konatigis la ĉeestantojn kun nove eldonitaj libroj de sia eldonejo KAVA-PECH kaj kiel ĉiam li donacis ilin al la muzeo. Josef Hron invitis al renkontiĝo en Pardubice, Ladislav Kovář prezentis planojn de EK Česká Třebová.

*Libuše Dvořáková*

## Ni startigis kunlaboron kun Danlando

En la tagoj 24-a kaj 25-a de februaro 2019 vizitis la urbon Svitavy dana esperantisto Jan Niemann el la urbo Elsinoro (dane Helsingør). Jan Niemann estas komitatano de IFEF, ankaŭ sekciestro de terminologio por fervojista trafiko. Al la Muzeo li donacis multajn librojn kaj gazetojn.



Ni ĉiĉeronis lin tra la urbo, montris urbajn memorindaĵojn kaj vizitis la Urban Muzeon kaj Galerion. Li speciale interesiĝis pri Oskar Schindler. Li konis la filmon „Schindler-listo“, sed li ne sciis, ke Schindler havis fabrikon ankaŭ en proksima Brněnec. Nome, en la filmo ne evidentas, ke la fabriko troviĝas en Ĉeĥio. Tial dum lia alia plurtaga vizito ni iros ankaŭ al Brněnec. Fine ni interkonsentis pri plua interŝanĝo de libroj kaj Jan promesis prelegon pri sia lando enkadre de vojaĝistaj vesperoj, kiuj okazadas en la Esperanto-muzeo. El Svitavy li direktis sin al Pardubice, kie li prelegos antaŭ studentoj de la Trafika Fakultato de Pardubice.

*Libuše Dvořáková*

## Esperanto eniros la registron de kulturaj valoraĵoj de Respubliko Kroatio

Kroata Esperanto-Ligo ĵus ricevis leteron, fakte la Decidon de Ministerio pri kulturo, kiu konfirmas, ke Esperanto estis deklarita nemateria kultura heredaĵo en Respubliko Kroatio, konforme al la Leĝo pri protekto kaj gardado de kulturaj valoroj. La kultura valorajo Esperanto eniros la registron de kulturaj valorajoj de Respubliko Kroatio sub la numero Z-7298.

Supozeble ni povas la oficialan decidon konsideri la plej granda atingo en la 110-a historio de Esperanto en Kroatio. Post Pollando ankaŭ en Kroatio Esperanto estas la protektata nemateria kultura heredaĵo. Ni esperas, ke la kroata dokumento helpas al aliaj landoj efektiviĝi la kulturan protekton de Esperanto. La procezo de enirigo de Esperanto en la naciajn registrojn de kulturaj nemateriaj heredaĵoj daŭris kvar jarojn.

*Spomenka Štimec*

**Rimarkigo:** Ankaŭ en Ĉeĥio estas folklorajoj enskribitaj kiel nemateriaj kulturaj valorajoj:

<http://www.nulk.cz/narodni-seznam/>

La kroataj kulturaj valorajoj:

[https://hr.wikipedia.org/wiki/Hrvatska\\_kulturna\\_ba%C5%A1tina](https://hr.wikipedia.org/wiki/Hrvatska_kulturna_ba%C5%A1tina)

## Nova granda vortaro

*Prof. Dr. Erich-Dieter Krause:*

**Plena Vortaro Esperanto-Germana.**

La vortaro estas la plej aktuala kaj plej ampleksa Esperanto-vortaro en la mondo kun 150.000 artikoloj. Prezo 114 EUR

<http://katalogo.uea.org/index.php?inf=9687>

## Pozvánka na výstavu Otokar Březina-překlady básní aneb domluvíme se v EU?

Vernisáž výstavy se uskuteční 11.6.2019 od 17:00 hodin v předsálí Jednacího sálu Senátu Parlamentu ČR v Praze.

Výstava s možností prohlídky Senátu bude přístupná do 24. června 2019. Záštitu převzal senátor Miloš Vystrčil.

Spolupořadatelé: Klub přátel esperanta ve Svitavách, z. s., Ústav pro českou literaturu Akademie věd ČR, v. v. i., v Praze, Společnost Otokara Březiny, z. s., se sídlem v Jaroměřicích nad Rokytnou

Výstava se uskuteční při příležitosti 150. výročí narození (2018) a 90. výročí úmrtí (2019) Otokara Březiny, osminásobného kandidáta na Nobelovu cenu. Ukázka některých překladů Březinových básní do cizích jazyků a jejich autorů připomíná nejen omezené možnosti šíření české literatury v zahraničí, ale také vede k zamyšlení o dorozumění obyvatel v mnohojazyčné Evropské unii.

Možné termíny prohlídek výstavy a Senátu Parlamentu ČR v Praze sdělí přihlášeným zájemcům na adrese [dvorakovi.mb@volny.cz](mailto:dvorakovi.mb@volny.cz) průvodce Ing. Viktor Dvořák, CSc. koncem května.

**Resumo:** En la senato de ĈR okazos ekspozicio pri la klasika ĉeĥa poeto Otokar Březina (1868-1929) kaj liaj esperantigitaj poemoj fare de Tomáš Pumpr (1906-1972) kaj Jiří Kořínek (1906-1988). La ekspozicio sub la nomo „Otokar Březina – tradukoj de poemoj aŭ ĉu ni interkompreniĝos en EU?“ estos malfermita por la publiko ĝis la 24-an de junio 2019.

# ESPERANTO KLUBO PROSTĚJOV 110-JARA

Fundamenton de Esperanto-movado en Prostějov metis arbarestro Augustin Toman kune kun profesoro Rudolf Fridrich, kiuj estis esperantistoj jam ekde la jaro 1898. Unuan prelegon pri Esperanto realigis Rudolf Fridrich en Prostějov en la jaro 1901. En jaro 1902 okazis prelego en societo Vlastimila. En majo 1906 realiĝis la unua kurso de Esperanto en la gimnazio, kiun ĉeestis 30 lernantoj. En la jaro 1907 estis en Prostějov fondita la Esperanto-rondeto, antaŭulo de nuna Klubo kaj en gastejo Ĉe Konvalinka okazis ekde 19a de februaro ĝis 11a de junio 1907 publika kurso por 25 anoj. La 6-an de februaro 1908 okazis prelego en Instruista societo de distriktejo Prostějov kaj ekde 19a de marto ĝis 25a de junio 1908 okazis por instruistaro de distrikto Prostějov kurso kun ĉeesto de 20 interesatoj. Poste okazis pliaj prelegoj, kursoj, ekspozicioj kaj publikaj konkursoj en la urbo.

ejon en Brno pri aprobo de statuto de "Klubo esperantista en Prostějov". La 17an de novembro 1908 estis fondo de la klubo malpermesita, ĉar la statut-proponoj havis mankojn. La 10an de decembro 1908 estis sendita nova postulo pri aprobo de korektita statuto kaj post 5 tagoj la regentejo permesis fondon de nepolitika societo kun nomo "Klubo esperantista en Prostějov" kaj ratifikis ties statuton. Kaj fine la 7an de februaro 1909 en konstruaĵo de popollernejo sur la strato Palackého okazis fonda ĝenerala kunveno de Klubo esperantista en Prostějov. Dum la kunveno estis prof. Fridrich elektita kiel prezidanto, estraranoj estis fraŭlino instruistino Františka Škamralová, Eduard Cekl, Bohuslav Ošřádal kaj Klement Urban. Kiel delegito de UEA estis elektita Rudolf Fridrich. Biblioteko kaj kurso de esperanta rondeto estis transprenitaj per la Klubo. La Klubo havis 60 klubanojn.



La 21an de oktobro 1908 petis fonda estraro konsistanta el sinjoroj Eduard Cekl, Klement Urban kaj Rudolf Fridrich la Gloran imperi-reĝan regent-



Kaj ĝuste 110 jarojn ekde la fondiĝo, jaŭde la 7an de februaro 2019, omaĝe al tiu datreveno, kunvenis en Prostějov esperantistoj por festi tiun jubileon.




La aranĝon partoprenis ne nur lokaj esperantistoj, sed ankaŭ anoj de la kluboj el Olomouc, Přerov kaj Šumperk. Esperantistoj el Prostějov bonvenigis ĉiujn en propra klubejo, kiun ili havas danke al subteno de Urbo Prostějov. Klubestro, sinjoro Liška, prelegis pri historio de la klubo, partoprenantoj havis eblecon trafoliumi zorgeme skribitan kronikon de la klubo kaj trarigardi riĉan kluban bibliotekon.



Kadre de la festo okazis ankaŭ membrokunveno de la klubo, kie estis elektita nova estraro. Delegitoj de partoprenantaj kluboj informis pri aktivecoj de siaj kluboj kaj sinjorino Hýblová informis pri aktivecoj en ĈEA kaj invitis al aranĝoj organizataj ne nur en Ĉeĥio, sed ankaŭ eksterlande. Ne mankis io por refreŝiĝi kaj bona humoro.

*Libuše Hýblová*

## Fino de la esperanta jaro en Česká Třebová



La 29-an de decembro 2018 jam tradicie kunvenis membroj de la E-klubo Amikeco kun siaj geamikoj el najbaraj, eĉ malproksimaj kluboj por rememorigi okazaĵojn de la pasinta jaro kaj informi sin reciproke pri planoj por la jaro venonta. Partoprenantoj ankaŭ rememorigis niajn geamikojn, kiuj ofte ĉeestis dum silvestraj vesperoj en pasintaj jaroj, sed kiuj nin forlasis en la pasinta jaro – Aniĉka Pištorová kaj Josef Jílek.

Programo de la vespero estis kiel kutime distra – krom dancado, kiun subtenis per sia muziko sinjoro Peša el Svitavy, okazis kvizo kun malfacilaj demandoj el diversaj fakoj. Ĉefa temo de la vespero estis nunjare „Bona loĝejo (stango)“ laŭ ĉeĥa ŝerckunaĵo „Dobré bydlo (bidlo)“. Partoprenantoj prezentis je tiu temo amuzajn scenetojn en kiuj ili prezentis sian fantazion.

Post la noktomeza tosto, per kiu oni bonvenigis Novan jaron, estis disdonitaj multnombraj donacetoj por rememorigi tiun okazaĵon. En malfruaj noktaj horoj partoprenantoj disiris al siaj loĝejoj kun deziroj de sukcesplena kaj feliĉa nova jaro 2019.

L. Kovář

## Zamenhof-tago

La 15-an de decembro esperantistoj en la tuta mondo festas [Zamenhofan tagon](#). Tiun tagon en la jaro 1859 naskiĝis L. L. Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto. La tradicio festi tiun tagon kiel Esperanto-festotagon devenas jam de la 20-aj jaroj de 20-a jarcento. Zamenhofa tago estas iam nomata ankaŭ Tago de la Esperanto-libro aŭ Tago de la Esperanto-kulturo. En tiu tago aŭ ĉirkaŭ ĝi esperantistoj okazigas renkontiĝojn por festi tiun tagon.



En Ĉeĥio ni komencis festi Zamenhofan tagon jam la 14-an de decembro 2018. Kelkaj grupetoj de esperantistoj renkontiĝis en Nacia teatro en Prago por spekti la operon *Sternenhoch*, prezentatan en Esperanto en brila traduko de Miroslav Malovec. Tiun tagon kaj tiun operon elektis por festi Zamenhofan tagon ankaŭ eksterlandaj esperantistoj, do la publiko estis vere internacia. Krom ni ĉeĥoj, partoprenis ankaŭ esperantistoj el Slovakio, Bulgario, Hungario, Danio, Francio, Luksemburgio kaj Usono. Post tiu kultura travivaĵo kelkaj el ni ankoraŭ promenis tra nokta Prago kaj babilis.



La festo de Zamenhofa tago kontinuis la 15-an de decembro, kiam esperantistoj renkontiĝis en kafejo kaj daŭrigis al E-monumento ĉe Kongresa centro, kiu estis tie starigita okaze de Universala kongreso en Prago en 1996. Tie estis plia programo preparita de klubo E-mental', en kiu ne mankis tosto kaj torto.



*Libuše Hýblová*

## 110 jaroj de EK Pardubice

Ni invitas vin la 22-an de septembro 2019 al la renkontiĝo okaze de 110-a jubileo de E-klubo Dr. St. Schulhof en Pardubice.

Samtempe ni rememoros la 155-an naskiĝdatrevenon kaj 100-an datrevenon de forpaso de ĝia fondinto Dr. Stanislav Schulhof.

Li estis origina Esperanto-poeto. Krom kultura programo ni vizitos lian tombon sur la juda tombejo.

Info: [ae@esperanto-ae.eu](mailto:ae@esperanto-ae.eu)

## Kulturdomo de Esperanto Kastelo Grezillono

adreso: Château de Grésillon, F-49150 Baugé en Anjou kontakto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), +33 2 41 89 10 34

### Programo en 2019

**12-16 aprilo** Ĥora-korusa kantado aŭ Natur-Arto

**26 aprilo – 4 majo** Intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj aŭ piedmigrado

**8-18 julio** Maratona E-kurso kaj interŝanĝoj de scioj

**6-16 aŭgusto** Festa Semajno por infanoj, familioj kaj popoldancoj

**26 oktobro – 3 novembro** Aŭtuna staĝo  
Vidu la agendon rete en : [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo)

## Ĉeĥa gazetaro pri EK Písek

Pri la Adventa matineo de la klubo La Ponto, organizata por la urba publiko, pri kiu ni informis en Starto 4/2018, p. 116, aperis artikolo en la loka semajna gazeto *Písecké postřehy* 1/2019. La artikolo de Pavla Dvořáková okupis la tutan paĝon kaj estis dediĉita ankaŭ al 110 jaroj de Esperanto en Písek. Pri la sama temo la 2-an de januaro raportis *Písecký deník*.

## La 4-a LUMINESK' en Königswinter 27.12.2018- 3.1.2019

La jarfina aranĝo okazis en Germanio en la JUFA-hotelo proksime al la urbo *Bonn*. Partoprenis ĝin 65 geesperantistoj el dek landoj.

Dum la semajno ni aŭskultis diversajn interesajn prelegojn. De Yoshie kaj Dieter Kleemann ni eksciis pri la insulo *Shikoku* kaj pri tradicioj rilate al la 9-a simfonio de Beethoven. De Christiane Oeter ni lernis kiel vivi sen kuirilo kaj ni povis gustumi kelkajn ŝiajn vegetarajn ellaboraĵojn.

Rakoen Maertens prelegis pri sia agado en UNESKO kaj UN parolante pri falsaj novaĵoj, misinformo, propagando kaj pri aliaj interesaĵoj. Li ankaŭ prezentis al ni Unesko-kurieron. Yves Nevelsteen parolis pri novaj vortoj en Esperanto, pri Esperantaj markonomoj en Benelukso kaj pri bitlibroj kaj bitrevuoj. Dima Ŝevĉenko prezentis sociajn retejojn kaj kun Anna Striganova parolis pri la revuo Esperanto, kiun ili redaktas kaj pri ilia eldonejo "Impeto".

Temoj de Wera Blanke estis: "Publike paroli - kiel efike interkomunikiĝi" kaj "Kiel traduki *Maulstasche* - terminologiaj konsideroj pri regiona specialaĵo". Anna Striganova prelegis pri: "Dronitaj urboj - fabelaj kaj realaj" kaj pri: "Kial nun modas antagonisto?" Vladimir Rodin konigis al ni la historion de la plej longa transsiberia fervojo. Barbara Branderburg parolis pri la nova biblioteko de GEA.

Amri Wandel parolis pri turismado en Israelo kaj Bernard-Régis Larue pri la unuaj tempoj kaj pri la perdo de la Edena ĝardeno. *laŭ Liba Gabalda*

# Raporto pri ciferecigado

(el konferenco en Benešov)

■ Ĉefa progreso estas ekstera asocia disko NAS, kun kiu havas rektan konekton Pavla Dvořáková, Miroslav Malovec kaj Vratislav Hirš (tiu prizorgas ĝin). Ĉiuj prilaborataj tekstoj, bildoj, videoj, sonregistroj ktp. estas sendataj rete al NAS kaj tie arkivitaj kaj sekurigitaj.

■ Sinjorino Anna Gybasová diligente enkomputiligas stencilitan informilon Pacdefendanto, kiun en Plzeň eldonadis Rudolf Burda post 1952, sinjorino Andrea Švubová, antaŭe Hasalová, simile enkomputiligas tiutempan bultenon de la Praga klubo kaj Jaroslava Malá informilon Medicinaj informoj-Sano. La transkriboj estas publikigitaj en la retejo de la klubo en Brno.

■ Vladimír Türk skanas materialojn pri la tendaro en Lančov. Ni akiris kolekton de tajpitaj prelegoj de Theodor Kilian, kiujn li persone legis inter 1932–1937 en Verda Stacio, la esperanta elsendo de radiostacio Radiojournal en Brno. La prelegoj estas elŝuteblaj en la retejo de KE Brno, en la rubriko "Ke stažení – Elŝutu". Estas inter ili la unua Esperantohoro elsendita la 1-an de marto 1933, en kiu la 14-jara Ivan Blatný, estonta granda poeto, deklamis poemon *Verda stelo* de Stanislav Schulhof. Jaroslava Malá laŭ mia peto laŭlegas la raporton de Kilian pri tutsokola kongreso en Ret-Radio.

■ El Znojmo post la forpasinta s-ro Bršlica alportis kaj transdonis al mi Viktor Dvořák kronikojn de la esperantista klubo en Znojmo. Mi skanis kaj transdonis ĉion al nia muzeo en Svitavy.

■ Danke al Viktor Dvořák ni ligis kontakton kun Literatura Arkivo de Aka-

demio de Sciencoj, kiu montris intereson pri medalionoj de ĉeĥaj esperantaj literaturistoj (mi sendis 36 medalionojn). En Svitavy aperis libro de lokaj apokrifoj, la apokrifoj pri Oskar Schindler ĉeĥe, ruse, ukraine kaj esperante (mia traduko el 2012, pri kiu mi jam forgesis). La eldono Sezonoj en 2018 eldonis libron *Nia diligenta kolegaro*. Inter 200 gravuloj de Esperantujo estas ankaŭ Ĉejka, Kamarýt, Lorenz, Píč kaj Urbanová.

■ En la Nova Scenejo de Nacia Teatro en Prago oni ludas operon de Ivan Acher "Sternenhoch" kantata en Esperanto. La komponisto muzikigis la esperantan version kaj tiel la traduko fariĝis originalo. La tuta teksto estis eldonita en la programo.

■ Vicon de valoraj materialoj transdonis al nia muzea arkivo la geedzoj Novobilský, la materialojn skanis nia bibliotekistino Marie Čumová.

■ Jan Werner transdonis al mi tekston de Josef Vondroušek pri historio de la klubo en Brno kaj tre valoran prelegon de František Sviták pri la situacio de nia movado post 1952 ĝis fondo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en 1969.

■ Danke al Karel Madzia ni posedas videojn el 2015 pri vizito de Pavel Sittauer en Chvalatice, kie staris la iama tendaro antaŭ Lančov. El 2012 ni havas alian videon, kie Pavel Sittauer priskribas 60 jarojn de Lančov.

■ En Almanako Lorenz 2018 aperis artikoloj "Mia unua vojaĝo okcidenten" de Jarmila Rýznarová kaj "VEDEM – la vivo de infanoj kaj plenkreskuloj en la koncentrejo Terezín", kiun verkis mi.

*Miroslav Malovec*



# ĈEJ AKTIVAS 2019/01

oficiala informilo de ĈEJ

redaktata de Václav ZOUZALÍK kaj Léon KAMENICKÝ

■ ĈEJ partoprenis komitatkunsidon de TEJO okazintan dum Junulara E-semajno reprezentata de Komitato A Vít MIŠUREC. Pli pri la kunsido vi povas legi ĉe Libera Folio

<https://www.liberafolio.org/2018/12/31/1-a-komitato-de-tejo-eksigis-estraranon/>.

■ Komenciĝis novaj kursoj de Esperanto en Prago - ĉiumerkrede, ekde 19:30 en la Nacia Tehnika Biblioteko. Se vi konas iun, kiu ŝatus lerni Esperanton, ŝi aŭ li bonvenas kontakti Vít, ĉe [vit@tejo.org](mailto:vit@tejo.org) por ricevi pli da detaloj.

■ La fina raporto de la Erasmus+ projekto Plej Bonaj praktikoj en Lingvoinstruado estis sukcese aprobitaj kaj ni povis fini ĉiujn administrajn kaj financajn taskojn rilate al ĝi. Pli da informoj pri la projekto troveblas ĉe <http://instruado.esperanto.cz/>.

■ Ankaŭ ĉi-jare ĈEJ planas partopreni en la foiro de neregistaraj organizoj (NGO market) kaj serĉas helpantojn por prezenti Esperanton en nia budo.

Por pli da informoj kontaktu:

[p.jalaksova@gmail.com](mailto:p.jalaksova@gmail.com).

<https://www.forum2000.cz/projekty/ngo-market>

■ ĈEJ-Tago en Brno - la 4-an de Majo 2019 ni planas organizi unutagan renkontiĝon ĈEJ-Tago, dum kiu okazos ĝenerala asembleo, prezentaĵo pri Esperanto por publiko kaj diskutrondo pri ankoraŭ ne elektita temo. Pli da informoj venos dum venontaj semajnoj.

■ Aktivuloj el nia praga klubo planas varbi novajn homojn pere de platformo meetup.com. Se vi volas helpi kun organizado de la proponota sesio, sentu vin

liberaj kontakti Paulína JALAKŠOVÁ, ĉe [p.jalaksova@gmail.com](mailto:p.jalaksova@gmail.com).

■ Ĉi-jare povos niaj membroj ricevi rabaton por partopreni IJK-on 2019 en Liptovský Hrádok, Slovakio. Pliaj informoj venos baldaŭ.

■ Novaj membroj de ĈEJ povos partopreni lotumadon pri rabato por Somera Esperanto-Studado, kiu okazos en Nitra, Slovakio. <https://ses.ikso.net/2019/eo/>

■ Vi povas aliĝi al laborgupo pri preparo de septembra ekspozicio pri IJK-oj en Esperanto-muzeo en Svitavy.

■ Pripensu vian kandidatiĝon al la Estraro de ĈEJ (Komitato kaj Revizia Komisiono). Balotoj por ĝi okazos dum la ĈEJ-tago en Brno.

■ Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe

<http://mladez.esperanto.cz/>

ĈEJ AKTIVAS 2018/02 fare de Václav ZOUZALÍK kaj Léon KAMENICKÝ estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonda

<https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/>.


Václav Zouzalík



<https://www.set-lancov.cz/>

## Du novaĵoj de KAVA-PECH

Tuj en januaro aperis du novaĵoj en la eldonejo KAVA-PECH, unu en Esperanto, la dua en la ĉeĥa, tamen ligita al Esperanto, ĉar ĝi prezentas ĝian iniciatinton L. L. Zamenhof.



*La Gregoria kalendara reformo kaj ĝiaj postefikoj* estas libreto laŭamplekse modesta, sed enhave tre riĉa: Ĝin kunverkis du profesoroj, Hans Michael Maitzen kaj Reinhard (Renardo) Fössmeier. Sed ne antaŭtimu! Ili verkis ĝin en bone komprenebla stilo, do oni bezonas esti nek astronomo, nek matematikisto, nek historiisto por povi bone kompreni ĝin.

En ĝi estas priskribita la gregoria kalendara reformo de la jaro 1582 inkluzive de la koncerna papa buleo (en la latina originalo kaj paralela traduko al

Esperanto), sed ankaŭ ĝiaj postefikoj al diversaj historiaj eventoj. Ĝuu mem almenaŭ fragmenton:


*La franca imperiestro (kronita je la 2-a de decembro 1804) pretigis en Bulonjo sian Grandan Armeon de 180 mil soldatoj dum la jaro 1805 por realigi invadon de Britujo, ĉar li ĝuste taksis la francan malsuperecon al la brita mararmeo, konfirmitan per la malvenko en la marbatalo de Trafalgar je la 21-a de oktobro tiujara. Sed pro la minacanta atako de diversaj eŭropaj landoj kaj regnoj, kiuj celis haltigi la ekspanziismon de Napoleono, li rezignis pri tiu invado kaj de Bulonjo moviĝis direkte al Aŭstrio, kies imperiestro Francisko la Unua kontraktis aliancon kun la rusa caro Aleksandro la Unua por ataki Napoleonon.*

*La kampanjo atingis unuan kulminon per la batalo ĉe Ulm en Bavario, kie la aŭstra armeo estis komplete detruita pro tio, ke la rusaj aliancanoj malfruis en la alveno al Ulm ĝuste je 12 tagoj, la tiama diferenco inter la gregoria kaj julia kalendaroj!*

*La malfruo de la cara armeo je tiu tempintervalo estas temo de historiista diskuto. Kelkaj kondamnas la interpreton per la kalendara diferenco en la militstrategio kiel „bizaran miton“. Sed klarigo, kial tiu tempa koincido estis hazardo, restas defio por aro da akademiaj disertacioj.*

La 31-paĝa libreto kostas 77 Kč, sed por la membroj de ĈEA la prezo estas 39 Kč. Ĝi estas mendebila ĉe la libroservo de ĈEA (en Esperanto-muzeo Svitavy), aŭ rekte ĉe la eldonejo KAVA-PECH, [info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz)

La dua libro estas en la ĉeĥa, tial mi daŭrigos ĉeĥe, por ke bone komprenu ankaŭ la Esperanto-komencantoj.



Jedná se o knihu Alexandra Korženkova *Ludvík Lazar Zamenhof – Život, dílo, ideály* v překladu Jindřicha Košťálka. Místo popisu uvedu recenzi Ruth Jochanan Weiniger, která publikuje i o Zamenhofovi, také ho zmiňovala ve svých přednáškách na evangelické teologické fakultě UK, a která byla iniciátorkou tohoto vydání:

*Některé epochy nelze pochopit bez porozumění určitým myšlenkovým směřům, které v nich vznikly a nezvratně ovlivnily smýšlení lidstva. K přelomu 19. a 20. století tak nerozlučně patří vznik esperanta a nadějí s ním spojených. Před sto lety se esperanto stalo průsečí-*

*kem nejrůznějších, někdy zdánlivě nesmiřitelných světónázorů: ateisté, římskí katolíci, svobodní zednáři, utopičtí pacifisté, vědci, stoupenci náboženství bahá'í a mnozí další viděli v esperantu prostředek, jak své myšlenky sdělovat celému lidstvu.*

*Kniha největšího současného znalce dějin esperantského hnutí Alexandra Korženkova nabízí jedinečný vhled do historických souvislostí Zamenhofova života a díla. Ukazuje, že jeho „neutrálně-lidský“ jazyk esperanto byl zamýšlen jako podstatná, ale nikoli jediná součást velkého univerzalistického projektu. Tím bylo vytvoření „neutrální“ jazykové, kulturní, náboženské a politické roviny, na níž by se mohli rovnoprávně stýkat příslušníci jednotlivých etnik jako „člověk s člověkem“. Autor podrobně stopuje vlivy, z nichž tato myšlenka vznikla (evropské osvícenství, specificky evropský koncept národa, mesiánské naděje judaismu) i to, jak byla přijímána a jakými proměnami prošla.*

*Na konci knihy je připojeno několik významných Zamenhofových textů, aby i ne-esperantista mohl čerpat přímo z dobových pramenů. Publikace je určena všem zájemcům o historii, filosofii a duchovní dějiny lidstva.*

Kniha je v pevné vazbě, má 131 stran a stojí 187 Kč. Členové ČES ji ale mohou zakoupit v knižní službě ČES nebo přímo v nakladatelství KAVA-PECH za zvýhodněnou cenu 157 Kč.

Petro Chrdle,  
[www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz)  
[info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz)

## JUBILEANTOJ DE JANUARO, FEBRUARO KAJ MARTO 2019

Ing. Michal Balík, Olomouc  
Eliška Mikušová, Domažlice  
Jarmila Čejková, Frýdek-Místek  
Eva Mitvalská, Třebíč  
Miloslav Červenka, Otrokovice  
Lubomír Musil, Nasavrky  
Ing. Jiří Dudek, Sychotín  
Václav Němeček, Praha  
Anna Dzuňová, Přerov  
Emil Osčiatka, Roudno  
Magdalena Grimová, Opava  
Jozefína Petrová, Lukavec u Hořic  
Anna Grozmanová, Kopřivnice  
Ing. Jan Rabl, Ostrava  
Jaroslava Hamajdová, Zruč nad Sázavou  
František Sklenář, Třebíč  
Petr Hillebrand, Jablonec nad Nisou  
Ludmila Tesařová, Ostrava  
Vlasta Chmelová, Lázně Bohdaneč  
Miloš Thér, Náchod  
Mgr. Oldřich Kníchal, Pécs, HU  
Libuše Tichá, Praha  
Ing. Jan Kovařík, Opava  
Jarmila Valentová, Velké Losiny  
Jaroslava Lipčíková, Prostějov  
Dr. Phillipe-Schweizer Benoit, Praha  
Milena Pancová, Písek

*Al ĉiuj jubileantoj ni deziras firman  
sanon, bonhumoron, ĝojon en la vivo!*



## 49-a Lingva Seminario

2019-05-09/12 Skokovy

Familieca ripoziga etoso, senbara medio, 2–3-maks. 4-litaj ĉambroj (kun lavujo; duŝejoj/necesejoj surkoridore). PREZO proksimume 430 CZK/tago (1 Eŭro = ĉ. 26 CZK) por kompleta servo je unu tago (tranokto + 3 manĝoj). Oni pagas surloke. Eblas veni ankaŭ por malpli da tagoj. Info: [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz)

## Ni kondolencas

La 13-an de januaro 2019 forpasis **Mgr. Anna Mrázová** (85-jara) el Rokycany, membrino de EK Plzeň kaj edzino de tradukanto Jaroslav Mráz (1933-2005). Ŝi estis aktiva kaj laborema klubanino.

## Baldur Ragnarsson

(1930–2018)


La 25-an de decembro 2018 en sia 88-a vivojaro forpasis Baldur Ragnarsson, islanda lingvoinstruisto kaj eminenta Esperanto-poeto, plurjara kandidato por la literatura Nobelpremio. En la Esperantan literaturon li enskribiĝis per poemaroj *Ŝtupoj sen Nomo*, *Esploroj*, *La Lingvo Serena*, *La Neceso Akceptebla*, *La Fontoj Nevideblaj*, *Laŭ Neplanitaj Padoj*, kaj *Momentoj kaj Meditoj*. Gravaj estas ankaŭ liaj tradukoj el la islanda literaturo *Islandaj Pravoĉoj*, *Sagao de Njal*, *Sagao de la Volsungoj*, *Sagao de Egil*, *Edda* kaj romano de Nobel-premiita Halldór Laxness *Sendependaj homoj*.

# Věra Podhradská

(13.8.1939 – 5.2.2019)

La 5-an de februaro 2019 venis trista informo pri forpaso de honora membrino de ĈEA kaj iama asocia prezidantino **Věra Podhradská** post unusemajna restado en hospitalo kun virozo, verŝajne gripo. Ankoraŭ en la lito ŝi pensis pri la asocia kongreso ĉi-jara en oktobro kaj skribis siajn notojn, kion necesas fari.

Laŭ ŝia propra rakontado logis ŝin al Esperanto emerita operkantistino Věra Borská, loĝanta en la sama domo, kiu al kelkaj enuantaj infanoj proponis en sia loĝejo kurson de Esperanto, deklamado kaj aktorado. En la kluba kroniko de Brno subskribo de Věra aperis la unuan fojon la 18-an de novembro 1951.



*Subskribo de Věra Borská kaj ŝiaj knabinoj Věra Podhradská, Jaroslava Novotná, Inka Handlová kaj Jarmila Rybová (nun Ĉejková)*



*La grupo de la 11-jaraj knabinoj partoprenis ankaŭ solenon de la 50-a datreveno de la klubo. Vera partoprenis en 1952 kolegion en Doksy (ŝi genuas dekstre en striita pulovero).*

Věra poste partoprenis somerajn kursojn en Doksy, Žimrovice, Chvalatice kaj ĉefe en Lančov, al kiu ŝi restis fidela ĝis 2018 en la estraro.

En 1969 ŝi partoprenis konstitucian kongreson en Brno, en 1976 ŝi estis elektita kiel anstataŭanto por la asocia estraro kaj ekde 1979 ŝi laboris kiel vicprezidantino ĝis 1999, kiam ŝi fariĝis prezidantino de la asocio ĝis 2005. Ankoraŭ unu periodon ŝi restis asocia komitatano, poste ŝi retiriĝis, sed laboris plu en du lokaj grupoj, same en la Klubo kiel en Societo, en kiu ŝi fariĝis prezidantino ekde 2008.

En 2002 ŝi estis nomumita honora membrino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.



*Věra Podhradská en la estraro de SET Lančov 2011*



*En UK Praha 1996 Věra Podhradská gvidis grupon de helpantoj kaj estis honorita*

## Jak platit svazu

### Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940 členství ČES
- 06941 členství UEA
- 06942 předplatné Starta bez členství
- 06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944 poplatek UK
- 06945 kongres EEU
- 50400 komise pedagogická ILEI
- 50401 písemný kurs začátečníci
- 50402 písemný kurs pokročilí
- 50404 Paroliga kurso
- 50405 svazové zkoušky
- 50800 sekce nevidomých LIBE
- 50900 sekce zdravotníků UMEA
- 51000 sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100 sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200 sekce informatiky
- 70100 komise pro tisk a inf.
- 80200 ediční fond
- 80300 propagace v tisku
- 80400 fond Tilio
- 80500 virtuální [adresa@esperanto.cz](mailto:adresa@esperanto.cz)

## Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz), tel. **723 672 335**. Předplatné uhradte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč

**La Gazeto:** 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto:** nur reta versio 410,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

**Juna Amiko:** 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, reta versio 190 Kč

**Literatura Foiro:** 1220,- Kč (\*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

### CIFERECIGITAJ GAZETOJ

Bonvenon en [Muzeum.esperanto.cz](http://Muzeum.esperanto.cz) en la suba parto de la biblioteka subpaĝo, kie troviĝas ligiloj al entute 13 senpage elŝuteblaj ciferecigitaj Esperanto-gazetoj, eldonitaj en 1902-1968 sur teritorio de la nuna Ĉeĥio. Aldonitas ankaŭ 4 nuntempe aperantaj *Starto*, *Praga Bulteno*, *Informilo de AEH* kaj *Dio benu*.

### DIGITALIZOVANÉ ČASOPISY

V dolní části stránky knihovny na webu [Muzeum.esperanto.cz](http://Muzeum.esperanto.cz) lze využít bezplatný přístup ke 13 digitalizovaným časopisům, vycházejícím na území dnešní ČR v letech 1902-1968. Naleznete zde i odkazy na archívy v současnosti vycházejících periodik *Starto*, *Praga Bulteno*, *Informilo de AEH* a *Dio benu*.

Periodikum Českého  
esperantského svazu, z.s.  
50. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz  
<http://www.esperanto.cz/starto>

Předplatné v Česku  
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:  
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,  
683 04 Drnovice,  
vratislav.hirs@esperanto.cz,  
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2019

--

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
50-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster  
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

<http://www.esperanto.cz/starto>

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva  
numero: 7.5.2019

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

## KALENDARO 2019

2019-05-11 Tradicia maja renkontiĝo de EK  
Šumperk nun en Žárová

Info: [libusehyblova@seznam.cz](mailto:libusehyblova@seznam.cz)

2019-05-09/12 Skokovy

Info: [drahotovaesperanto@email.cz](mailto:drahotovaesperanto@email.cz)

2019-06-16 Ĉantorio

Info: [suchanekj@seznam.cz](mailto:suchanekj@seznam.cz)

2019-07-14/27 Dua etapo SET Lančov

2019-07-28/08-09 Tria etapo SET Lančov

2019-08-09/11 Renkonto de eksaj tendaranoj

Info: [let.lancov@seznam.cz](mailto:let.lancov@seznam.cz)

<https://www.set-lancov.cz/>

2019-09-14 Inaŭguro de ekspozicio en Svitavy

Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

2019-09-22 110 jaroj de EK Pardubice kaj  
datrevenoj de Dr. S. Schulhof (1864-1919)

Info: [aeh@esperanto-aeh.eu](mailto:aeh@esperanto-aeh.eu)

2019-10-11/13 Konferenco de ĉeĥaj fervojistoj

Info: [annaabelovska@seznam.cz](mailto:annaabelovska@seznam.cz)

2019-10-17/20 La 17-a Kongreso

de Ĉeĥa E-Asocio en Brno

Info: [cea@esperanto.cz](mailto:cea@esperanto.cz)

2019-11-30 Antaŭkristnaska renkontiĝo en

Písek, Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

## Eksterlande

2019-05-09/12 Tutslovakia Esperanto-  
Kongreso en Liptovský Hrádok

Info: <http://ter.esperanto.sk/2019/>

2019-06-07/10

La 96-a Germana E-Kongreso en Neumünster

Info: [sibylle.bauer@esperanto.de](mailto:sibylle.bauer@esperanto.de)

2019-07-6/15

La 55-aj Baltiaj E-Tagoj en Panevežys, Litovio

Info: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt)

2019-07-12/20 SES Nitra

<https://ses.ikso.net/2019/cs/>

2019-07-20/27

La 104-a Universala Kongreso  
de Esperanto en Lahtio, Finnlando

Info: <https://uea.org/kongresoj>

2019-07-28/08-04

La 75-a TEJO-Kongreso  
en Liptovský Hrádok, Slovakio

Info: <https://ijk2019.tejo.org>

2019-08-10/17 69a KELI-kongreso en  
Révfülöp, Hungario

2019-08-24/31

La 86-a Itala E-Kongreso en Trieste  
<https://kongreso2019.esperanto.it>



Zamenhof-tago en Prago



Jarkunveno en Svitavy



Esperanta Silvestro en Česká Třebová



Vizito de dana gastoj en Svitavy



110 jaroj de EK Prostějov



Post la seminario „Eŭropaj fervojoj“ en Pardubice